

EN FOIRO DE L'ORIENT'

Vortoj/muziko: Angelo Branduardi
Esperantigo: Emanuele Rovere)

En Foiro de l'Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.

Kaj venis kato, kiu manĝis la museton, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.

Kaj venis hundo, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.

Kaj venis bastono, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.

Kaj venis fajro, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient'...

Kaj venis akvo, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient'...

Kaj venis bovo, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient'...

Kaj venis buĉisto, kiu buĉis la bovon, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient'...

Kaj l'angelo de la morto, super la buĉisto, kiu buĉis la bovon, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient'...

Kaj fine la Sinjoro, super l'angelo de la morto, super la buĉisto, kiu buĉis la bovon, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.